# SUDFRANCA STELO

Bulteno de la Esperanto - Federacio «Languedoc - Roussillon»

5, Quai Vauban - PERPIGNAN (P.-O.) - Téléfono 34-38-84

N° 26 ---------------------- Jara abono ; 2 F ------4-a trimonato 1967

----oo8oo----

## Somero 1968 = Feliĉa somero por la esperantistoj de Sud-Francujo

---

Ni estas je komenco de nova labora jaro. Vere feliĉa jaro ! Kial ?

La Universala Kongreso okazos dum komenco de aŭgusto en MADRIDO. Do ne estos malproksime kaj estos relative facile, por ni aŭ niaj novaj lernantoj, partopreni tiun interesan gravan akazaĵon.

Multaj eksterlandaj esperantistoj survoje al MADRIDO, trairos nian regionon. Pli ol 1000 laŭ konpetenta prognozanto.

En AIX en PROVENCE , do tute proksime, okazos du allogaj kongresoj Dum Pasko, la nacia kongreso de U.F.E., dum julio, la Universala kongreso de la esperantistaj studentoj.

Plie oni parolas pri aliaj universalaj aranĝoj en Perpignan kaj en Montpellier.

Do ne perdu tempon, tuj varbu novajn lernantojn kaj dum la somero ili eblos tute facile uzi esperanton kaj konstati ĝian oportunecon.

-o-o-o-o-o-

La Federacia Kongreso organizota de la grupo de ALES, okazos antaŭ Pasko verŝajne en suda parto de departemento Gard. Aigues-Mortes aŭ Aubais.

Atentu pri ĝi kaj ĉeestu multaj.

-o-o-o-o-o-

## NOVA STRATO ZAMENHOF EN NIMES.

Korajn gratulojn al la esperantistoj de la franca Romo !

Legu informojn en interna paĝo.

## VIVO DE LA GRUPOJ

-:-:-:-

ALES

Se neniu el niaj grupanoj partoprenis internacian kongreson du reciprokis la lastjaran viziton de sia pola korespondanto. Dum ilia restado en Pollando ili interkontaktiĝis kun diversaj esp. rondoj kie ili prelegis kaj montris lumbildojn pri nia pitoreska cevena regiono.

En la komenco de septembro du usonanoj trapasis nian urbon. Car ili tre malbone parolis la francan lingvon, ili estis spertantaj gravajn malfacilaĵojn ĉe la poŝtoficejo kiam tute hazarde envenis alesa esperantisto. Ekvidante verdan steleton ĉe la brustoj de tiuj eksterlandanoj, li tuj alparolis ilin kaj je ilia granda kontenteco kaj la ne malpli granda de la poŝtoficistoj, ĉio subite tute glatiĝis. " Ciam kaj ĉie surmetu vian verdan stelon."

La grupo kunvenos en la komenco de oktobro por starigi la labor-planon por 1967-1968.

PERPIGNAN

Raporto pri la esperanto-agado

La kultura Esperanto-Centro de Perpignan kunvenis siajn anojn mercredon, la 20-an de septembro je 18 h 30, por plani la laboron dum la lernjaro 67/68.

La plenkreskuloj kunvenos la unuan merkredon kaj la trian, ĉiumonate je 18 h30, ĉe la sidejo de la Kultura Centro, por babili esperante pri la diversaj eventoj alvenitaj dum 15 tagoj.

Por la infanoj kaj la studentoj okazos kursoj ĉiuĵaŭde :

1) ĉe Liceo Arago, de la 11-a ĝis la 12-a matene.
2) ĉe Lernejo Racine, por la studentoj de la 3-a ĝis la 4-a vespere, por la infanoj de la 4-a ĝis la 5-a vespere.

Por la plenkreskuloj, la kunvenoj malfermos la 4-an de oktobro por la infanoj kaj la studentoj de Lernejo Racine, la kursoj malfermos la 5-an de oktobro, kaj por la studentoj de Liceo Arago, la 12-an de oktobro.

Dum oktobro ni akceptos F-inon Lola ESTRADA esperantistino el Mansera (apud Barcelono). Estos okazo por denove kunveni kaj babili en nia lingvo.

NIMES

La jaro finiĝis sufiĉe bone per sukceso de 3 gelernantoj (inter kiuj unu liceano) en la Atesto pri Lernado. S-ino AVESQUE kaj S-ro LLORCA iris poste eksterlanden dum la libertempoj : S-ino Avesque iris en Hungarujon, kaj revenante, ŝi haltis en la esperanta kampadejo de Primoŝten, kie estis ankaŭ S-ro Llorca. El Primoŝten (Jugoslavio) S-ro Llorca sendis entuziasmajn poŝkartojn. Michel FABRE intencis iri al Greziljono en septembro, sed fine kaj bedaŭrinde li ne povis plenumi tiun projekton.

S-ino VOLPELLIERE ricevis inviton por partopreni la urban delegitaron pro la ĝemeliĝo de Nimes (dank'al la agado de J.CICHOVA por tiu ĝemeliĝo.) Ŝi profitis la okazon por vidi tiun ĉekan amikinon, kiu aranĝis kunveneton kun tri aliaj esperantistaj praganoj ( inter kiuj la sekretario de la grupo) kaj en tiu kunveneto ĉeestis tute neatendite juna jugoslavo renkontita sur la vojo !

Ni povas ankaŭ anonci, ke strato , en nova kvartalo, estis nomita strato Zamenhof (post nia peto) kaj ni intencas organizi inaŭguran ceremonion al kiu ni invitas jam ĉiujn esperantistojn de nia regiono. Kiam la dato estos fiksita ni skribos al la diversaj grupoj.

-:-:-:-:-

KONGRESO EN NORD ITALUJO

Cent-dek esperantistoj (proksimume) el 12 landoj de Eŭropo partoprenis kongreson de K.E.L.I. de la 22 ĝis la 29 julio, en Torre-Pellice, ĉarma urbeto piede de la Alpaj montoj.

La kongresanoj loĝis en komuna domo, kaj la manĝoj okazis ankaŭ komune. La sidloko je la manĝotablo ne estis libervola, sed elektita por ke je ĉiu manĝo estu nova najbaro. Tiel, ni amikiĝis kaj babilis kun ĉiuj en tiu vera internacia medio.

Belaj ekskursoj en la montaro, vizito de la famaj fabrikoj FIAT kaj MARTINI en Torino ĉarmis nin. Ambaŭ firmoj uzas esperanton, kaj en FIAT fabriko gvidis nin profesia gvidistino esperanton parolanta.

Ni notis ke ĉeestis tri sudfrancanoj sur kvar francoj.

----ooOoo----

o o
O

LA PAGE DU TRESORIER.

-:-:-:-:-

Un quotidien coûte 0,40 F. Vous dépensez par an ................ 144,00F
Un paquet de cigarettes : 1,35 " " " " " .................. 486,00
Un billet de cinéma : 4,00 F. = un par semaine 50 x 4,00 ...... 200,00F
Un hebdomadaire : ....1;00 F. = " " " " .................. 50,00F

On pourrait continuer la série.... Vous pouvez probablement trouver une place pour vous dans cette liste. Ainsi, sans hésiter vous dépensez de grandes sommes pour votre plaisir; pourquoi ne pouvez-vous pas consacrer des sommes moins importantes pour l'espéranto ?

11 même dans le Bulletin

D'après la décision du dernier congrès national :
Payez vos cotisations au trésorier de votre groupe local ( ou de votre fédération). Mais absolument pas à U.F.E.

Vous pouvez choisir entre ces cotisations :

cal

1°) U.F.E.

a)- Avec la Revue Francaise d'Esperanto

Membre Titulaire = Membro-abonanto MA ........................ ~~20~~ 30 Fr.
" " Moins de 21 ans = J.MA ................................ ~~10~~ 15 Fr.

b)- Sans la Revue Francaise d'Espéranto

Membre adhérent = Simpla membro SM ........................... ~~8~~ 6 Fr.
~~" " Moins de 21 ans = J. SM ................................ 2 Fr.~~

2°) U.E.A.

a)- En recevant le jarlibro de U.E.A. et la revue Esperanto

Membro-abonanto MA................................................ 35 Fr.
" " Moins de 22 ans = J. MA ................................ 27 Fr.

b)- En ne recevant que le jarlibro de U.E.A.

Membro jarlibro MJ.............................................. 17,50
" " Moins de 22 ans = J.MJ................................ 9. Fr.

C.C.P. N° 956-28 Montpellier.
Fédération d' Espéranto " Languedoc-Roussillon ".

# FEDERATION DEPARTEMENTALE ESPERANTO DE L'HERAULT

-:-:-:-:-:-:-:-

La Fédération Départementale Esperanto de l'Hérault est heureuse de vous annoncer sa naissance.

Son but est d'unir les espérantistes de l'Hérault pour intensifier l'action culturelle de l'esperanto en créant un lien d'amitié entre eux, en permettant aux isolés de se sentir moins seuls.
Les groupes déjà constitués sont prêts à aider de nouveaux groupes à naitre.

Bien que la Fédération soit entièrement indépendante, et n'adhère pas à U.F.E. , le bulletin " Sud-Franca Stelo ", nous donne très aimablement une page où nous mettrons nos informations.

NOTE PRATIQUE : La cotisation annuelle est de 3 Frs, y est inclus l'abonnement à Sud-Franca Stelo ( donc inutile à ceux qui ont payé la cotisation de repayer l'abonnement) . Pour les conjoints, la cotisation est de 1 Fr. ( Le conjoint ne reçoit pas le bulletin. )

MAIS ATTENTION : Pour les membres des groupes existants (actuellement Béziers et Montpellier) cette cotisation départementale est incluse dans la cotisation du groupe; donc seuls les isolés doivent envoyer leur cotisation de 3 Frs.

Si vous voulez que l'esperanto prospère dans notre département et si vous êtes contents de la naissance de notre nouvelle Fédération n'attendez pas pour payer votre cotisation 1968 ( vous bénéficierez du dernier numéro 1967 )

Vous pouvez envoyez les 3 Frs : - soit au CCP. de la Fédération Départementale Esperanto de l'Hérault N° 1689-39 Montpellier.

- soit en timbres postes de 0,30 Frs à la Trésorière Madame AUTHIER 31 Rue Carnot - BEZIERS.

N'oubliez pas d'indiquer votre nom et votre adresse.

Si vous désirez d'autres renseignements, ou faire des propositions d'activités, adressez-vous à la secretaire départementale Melle Simone MARTIN, 1 Bis Rue St Pierre de Trivisy. Montpellier.

MONTPELLIER : Esperanto Kultura Centro.

ADRESO : 5 Rue Docteur Roux.

C.C.P. : Groupe esperantiste de Montpellier N° 1 487 48 Montpellier.

KUNVENOJ : Ciun unuan lundon de la monaton 34 Rue de l'Université, je la 20 h 30.

La komitatanoj ( tio estas tiuj kiuj deziras klopodi por la disvastigo de la grupo ) kunvenaĝ la lastan lundon samloke kaj saman horon.

RESUMO DE LA PASINTAJ AGADOJ :

Junio :- Ĉeko, akceptita de sia korespondanto Sinjoro SENAUX, parolis al ni pri sia lando.
- Du grupaninoj ĉeestis la TEJOrenkonton en Pamiers (Ariège

Julio :- Ni aùdis Usbekis~~tano~~jn kaj respondis al ili (magnetofone)
- Du grupaninoj partoprenis la internacian kongreson de KELI en Torre-Pellice ( Italujo )

Aùgusto : - Anino ĉeestis la 52 an de U.E.A. en Rotterdam. Hazarde ŝi revetur[i]s kun du famaj kaj spertaj esperantistoj : Gesinjoroj ITO' Saburo de TOKIO. Ili loĝis en Montpellier unu semajnon. Bedaùrinde pro la ferioj la kontaktoj kun lokaj esperantistoj ne estis tiel multaj kiel dezirite. Tamen dank' al Sinjoro LENTAIGNE longa artikolo kun du fotoj aperis en ĵurnalo.

Septembro :Doktorino VIERNE montris diapozitivojn pri Nederlando kaj parolis pri esperanto en Lamalou-les-Bains.

La 25-an, la komitato kunvenis kaj komencis plani la laboron de la nova jaro.

-:-:-:-:-:-

RENCONTRE AMICALE A MEZE

Le dimanche 29 Octobre à partir de 10 heures aura lieu à Mèze, au Foyer des Campagnes, une rencontre amicale des esperantistes de la région.

Au programme :

- Voyage au Japon, au Pays-Bas.
- Diapositives " Information sur l'esperanto " de Lentaigne-Capus.
- Conversations amicales.
- Projets d'activités.
- Visite du port et du parc à huitres.

Note pratique : Déjeuner tiré du sac sur le port.